
Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT
novembro- decembro 2009, n° 11- 12 (1253- 1254)
Prezo € 5

# SENNACIULO

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo! --- Lanti

## 83-a SAT-kongreso
## Braŝovo
## Rumanio



## Nia Dosiero- Temporganizado en moderna vivo






**La 83-a Kongreso de SAT okazos inter la 1-a kaj la 6-a de aŭgusto 2010 en la belega urbo Braŝovo.**

Braŝovo estas urbo en Rumanio kiu situas en suda Transilvanio, 168 km norde de Bukareŝto. Ĝi estas la ĉefurbo de la samnoma distrikto (județ) kaj unu el la ĉefaj industriaj urboj de Rumanio. En 2009 ĝi havis 278.048 loĝantojn (hungaroj, rumanoj, germanoj, ĉeĥoj, slovakoj, ciganoj). Ĝis 1919 ĝi apartenis al Hungario (Brassó vármegye). En jaro 1749 en tiu urbo fondiĝis la unuaj du loĝioj de framasonismo en la tiama Hungario.

Karaj membroj de SAT, karaj legantoj. Jen lasta Sennaciulo de la jaro 2009. Estas mia espero ke vi ĝuis la enhavon kaj aspekton de ĉi tiu jarkolekto. Sennaciulo daŭre restas la plej grava rilatilo kun niaj membroj. La revuo estas daŭre la plej bona varbilo per kiu vi povas konvinki amikojn kaj konatojn pri la valoroj de SAT.

Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo estu interalie unu el la kialoj de via membreco al SAT.

Proverbo diras: kuiri kostas! Por funkciigi nian asocion ni bezonas vian helpon, vian subtenon.

Vi jam nun povas trovi la kotiz-tabelon en nia paĝaro <http://www.satesperanto.org/SAT-Kotizo.html> kaj en sekva numero de Sennaciulo. Klopodu pagi vian kotizon akurate. Konvinku aliajn esperantistojn aliĝi al SAT.

amike jakvo

## Enhavo

4 Filatela Servo kaj temporganizado en moderna vivo
5 Eta historio de la tempo
7 Mastrumi sian tempon... ĉu eblas?
9 Pri panjo, tempo kaj aliaj aferoj
10 Venko
11 Deklaracio SAT-kongreso
13 Libio forkaptas teron en riz-produkta regiono de Malio
17 La granda tero-fordono: nov-koloniismo per invito
23 Letero de leganto
24 Ŝanĝiganta Juĝsistemo
27 TŜEA (Wwoof)
28 Vizito de Medvedev en Svisio
29 nombroj
30 Religiemo en la mondo
32 Vintro

## Nekrologo

la 21an de julio 2009 forpasis en Bois Colombes (FR) pro malsano, 78-jara, nia kamarado, Michel-Flavius AUDIBERT (matr. 33710)*

La 24-an de septembro 2009. forpasis Jurij Davydov (naskiĝis en 1955). Li kreis socian organizon kaj mastruman komunumon "PORTOS" kaj helpis en organizado de SAT kongreso en Moskvo en la jaro 2000.

Ni ricevis sciigon pri forpaso de Helga Farukuoye, kiu dum multaj jaroj laboris en Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, Aŭstrio (matr. 35194)

Mortis k-do MITUISI Kiyosi, 26783, en la urbo Nagoya, Japanio, la 20-a de aŭgusto 2009, je la aĝo 95. Li naskiĝis en 1913 kaj esperantistiĝis en 1929. Li estis unu el la lastaj atestantoj pri la proleta esperanto movado de antaŭmondmilita Japanio.

La 4an de julio mortis en Cerny nia 76-jara k-do Jean-Louis Texier (matr. 32473)
Li dum multaj jaroj okupis diversajn gvidajn postenojn en Unuiĝo Franca por Esperanto kaj en UE

## SAT kreskas

35893* GACOND Andrée, Chevreuils 14, CH-2300 LA CHAUX DE FONDS, Svisio

35894* DARĴO Selin, 4 ter rue des Isards, FR-65200 BAGNERES DE BIGORRE, Francio

35895 GOSSET Timur, 4 ter rue des Isards, FR-65200 BAGNERES DE BIGORRE, Francio

35896 GVERINO Maksimiliano, 20 rue du Lieutenant Quennhen, FR-94300 VINCENNES, Francio

35897 JEONG Jiyun (Ajn), Sam-dong 170-41, Uiwang-si, Gyonggi-do, KR-437-813 UIWANG-SI, Koreio

35898 SANDGREN Daniel, Tuborgsgatan 1B, SE-21741 Svedio

35899* GROSJEAN Mireille, CP9, CH-2416 LES BRENETS, Svisio

35900* MASCIADRI Camila, Piazza Mondadori 2, IT-20122 MILANO, Italio

35901* KIM S.H., Sillim-dong 1608-9, 101 ho, Gwanak-gu, KR-151-015 SEULO, Koreio

35902 SOLOMON Mark, 2025 Druid Park Dr, US-21211 BALIMORE, Usono

35903 SOWERS Brandon, UC Davis TB-13, Davis, CA, US-95616 DAVIS, Usono

35904 DOJĈINOV Stefko Vasiliev, Ŝipĉenska epopeja 31, A ap. 7 KAZANLAK, Bulgario

35905 TARRACHINI Ermanno, Via Pascal 46, IT-41100 MODENO, Italio

35906 HARADA Tsukuru, Hakuzan 2-7-5, Servi Hakuzan 501, JP-862-0959 KUMAMOTO-SHI, Japanio

35907* ELIZAGARAI Miren, Plaza Castanos 5, esc. dcha, 7°B, ES-31010 BARANAIN, Hispanio

35908* FEDAK Mathé, 422 rte de Thônes, FR-74230 DINGY-ST-CLAIR, Francio

35909 MINNAJA Carlo, Via Carducci 5, IT-35123 PADOVA, Italio

35910 DASGUPTA Probal, L.R.U., Indian Statistical Institute, 203, BT Road, IN-700108 KOLKATA, Barato

35911 WON Jaba Hoyeon, Mangwon-dong 435-11, Mapo-gu, KR-121-230 SEULO, Koreio

35912 SOUZA MOREIRA Leandro, Av. Bezerra de Menezes 2690 ap.11, Parquelândia, BR-60.235 FORTALEZA, Brazilo

# Filatela Servo kaj temporganizado en moderna vivo




*Jam de kelkaj tempoj, la franca poŝtoficejo ebligis al ĉiuj krei siajn proprajn poŝtmarkojn. Kompreneble, tio estas komerca afero, tamen iel ebligas rebati al senanimaj vinjetoj... kondiĉe ke oni akceptu pagi la duoblon... Mi mem kreis mian poŝtmarkon !*

*Serĝo Sir'*

Dum multaj jaroj la Filatela Servo de SAT funkciis tiele: kamaradoj kaj simpatiantoj sendis al la SAT-sidejo poŝtmarkojn el ricevitaj kovertoj aŭ sendaĵoj, krom integraj kovertoj, poŝtkartojn kaj aliajn filatelaĵojn, ricevitaj ĉu de ili ĉu de konatuloj. K-do Modesto Ramelli dum jaroj faris la taskojn malglui poŝtmarkojn, aranĝi, ordigi kaj vendi ilin laŭeble por sendi monon al SAT. Ĉio ne estis komparebla al la enspezoj de granda multnacia entrepreno, sed ja kontribuis al la funkciado de la organizo kaj al kolektiva kunlaboro en ĝi.

Tia funkciado pluokazos. Nun kiam la k-do Ramelli jam rezignis pri tiu zorgado, mi mem reprenas la taskon, kvankam tre verŝajne ne tiom profesie. Ĉiukaze mi ricevos (jam ricevas) ĉu rekte ĉu pere de la SAT-ejo poŝtmarkojn kaj ĉiajn aliajn filatelaĵojn. Tiudirekte mi profitas la okazon sciigi ke ne nur poŝtmarkoj interesas al kolektantoj, sed ankaŭ poŝtkartoj, kovertoj kaj ĉia tipo de sendaĵoj, kiuj havu poŝtmarkon aŭ almenaŭ stampadon. Por tiu celo prefere k-doj, apogantoj kaj simpatiantoj bv. uzi ĉiam kiam eblos poŝtmarkojn por sendaĵoj kaj ĉefe plej belajn troveblajn, eĉ se poste oni ne sendas ilin al SAT.

Tio enkondukas onin al pensigo pri kial kaj kiel la temporganizado en moderna vivo influas eĉ tiujn banalajn aferojn. Nome pli kaj pli oni uzas elektronikan poŝton anstataŭ paperan. Krome kiam oni alportas sendaĵon al poŝta oficejo, plej ofte oni ricevas, anstataŭ poŝtmarkon, simplan komputile presitan stampon aŭ similan fuŝaĵon malbelan kaj ne profiteblan. Uzanto kontraŭ sama prezo ricevas malpli. Ricevonto de sendaĵo ricevos malpli. La laboristo de poŝta oficejo missupozas, ke la laboro estis pli facile plenumita, sed ne rimarkis ke tio elfosas lian propran tombon. Nur la estraroj de la poŝta servo (publika) ĝojas ke ili bojkotas sian propran entreprenon, kiu sekve iam estos privatigita.

De ĉiam esperantistoj uzis poŝton. Nuntempe plie la elektronika poŝto ja estas multe pli rapida. Tamen ne ĉiam rapido nepras. Por multaj okazoj la tuŝebla paperaĵo povas indi pli ol la rapida respondo elektronika: la papera letero respektive poŝtkarto povas esti pli bela, pli interesa, pli montrebla, pli ekspoziciebla ktp, definitive pli valora en la estonteco. Do, ni revenu, se iam ni deflankiĝis, al paperaj sendaĵoj, kiam eblos. Ni uzu kaj energie postulu en poŝtaj oficejoj verajn kaj belajn poŝtmarkojn (ne nur komunajn), ke oni malmulte stampu ilin (por ne difektigi ilin), ke oni pluvalorigu niajn sendaĵojn, ĉar ja oni pagas por ĉio tio kaj oni rajtas ricevi ĉion tion. Tia konduto estas rezistado al nova tendenco en poŝto, kiun tiukaze profitos nur privatuloj aŭ kapitalistoj kaj ne uzantoj.

Poste kiam viaj ricevaĵoj ne tiom utilos al vi kaj vi bezonos spacon hejme, sendu ilin al la SAT-ejo aŭ al la tiama respondeculo pri la Filatela Servo; tio estos ioma profito por la organizo. Se vi ne deziras doni personajn skribaĵojn, estas facile depreni ilin. La filatelaĵo restos utila por la onta vivo de la laboristaro esperantista kaj estos eĉ detaletoj kiuj eble utilos al pluhavo de publika servo. Mi profitas la finon por instigi la kamaradojn mendi seriojn aŭ kolektetojn de poŝtmarkoj pri iu ajn temo (bestoj, birdoj, floroj, pontoj, literaturo, milito ktp) eĉ se ili ne estas kolektantoj, se ili interesiĝas pri tiuj temoj. Mi sendus ilin al la mendinto kaj oni sendu iom da mono al SAT, ekzemple kiel rekta kontribuo aŭ kiel sendo de la Filatela Servo. Kompreneble kolektantoj aŭ mendoj por kolektantoj (donacoj) estos speciale bonvenaj.

*Kani*

❑❑❑